571(489.7 : 119.8)

PACO KAJ MILITO DUM LA FEREPOKO DE BORNHOLM

De OLE KLINDT-JENSEN (Danujo).

Aparte situas, en Baltika Maro, *Bornholm*, kiu nur en la vikinga tempo estis firme ligata al Danlando. Tamen la insulo montras kulturan interrilaton kun la ceteraj danaj landoj dum la antaŭaj partoj de la ferepoko, precipe kun Skanio [1]). La situo de la insulo estis grandega avantaĝo por ĝiaj marveturantaj loĝantoj malproksimen vojaĝantaj, sed ĝi signifis ankaŭ danĝeron. Malamikoj povis facile invadi, precipe sur la sudan marbordon. La fekundeco de la insulo, la riĉajoj kolektitaj de la loĝantoj allogis fremdulojn. Aliflanke oni rajtas supozi, ke ankaŭ la bornholmanoj utiligis eblojn por akiri gajnon pli facile ol per komerco.



Fig. 1.

Miniatura kopio de la biendomoj de *Sorte Muld*, konstruita en la Muzeo de *Bornholm* de Oluf Olsen. Skalo 1 : 20.

La ferepokaj tomboj montras, ke armiloj apartenis al la vira ekipaĵo, precipe lanco kaj ŝildo, la riĉuloj plie portis glavon. La virinaj tomboj montras

[1]) Skanio, la plej suda provinco de Svedujo, estis dana ĝis la mezo de la 17-a jarcento (vidu *Faktoj pri Danlando*, Kopenhago 1948, p. 5).

pacajn ŝmukojn; ŝpinpeziloj kaj ornamajoj estas ne maloftaj. Tre multajn tombojn, kelkfoje riĉajn, oni esploris en la lasta duono de la antaŭa jarcento. La Nacia Muzeo daŭrigas tiun tradicion; sed la kulturbildo montrata de tiuj tomboj estas unuflanka. Pri la ĉiutaga vivo ili rakontas nur malmulton, kvankam ankaŭ la bezonaĵoj de la vivo estis donataj al la mortintoj. Nur per elfosado de domrestaĵoj kaj — kiel ajn senkompate tio sonas — prefere de restaĵoj de brulintaj domoj ni akiras detalan bildon pri la vivo de la pratempa popolo. Pro la brulo la loĝantoj plej ofte devis subite forlasi la domon. Tial estas eble per zorga elfosado konservi momenton de la ĉiutaga vivo, la lastan antaŭ la ekflamo de la domo.

Por serĉado de domrestaĵoj oni elektis kiel la unuan celon *Sorte Muld* („nigra humo"), kampo kolorigita de lignokarbo, 2 km okcidente de *Svaneke*. Antaŭe estis tie trovataj oraj moneroj kaj premfaritaj hombildetoj kaj dise sur la kampo lancopintoj. Laŭ legendo okazis sur *Sorte Muld* batalo inter fremduloj, kurlandanoj, invadintaj ĉe *Listed*, kaj bornholmanoj. Dum la mezepoko la loko estis nomata „la ora kampo". Post trovo de pratempaĵoj dise sur la kampo ni malkovris en 1948 restaĵojn de du domoj en la sama profundo meze de la norda flanko. La esplorado estis prokrastata ĝis 1949. Kune kun Dana Internacia Studentkomitato, kiu alvokis eksterlandajn studentojn por la fosLaboro, kaj per speciala ŝtata subvencio ni sukcesis elfosi *Sorte Muld* en 1949. Samtempe estis esplorata la rifuĝkastelo *Gamleborg* („malnova kastelo") en *Paradisbakkerne* („paradizaj montetoj"). En la posta jaro la esplorado estis daŭrigata en la rifuĝkastelo sur *Rispebjerg* en suda Bornholm, la ringokastelo, kiun elfosis eksterlandaj studentoj, dum arkeologoj solaj elfosis domrestaĵojn ĉe *Dalshøj* proksime al *Sorte Muld*. Ankoraŭ kelkaj rifuĝkasteloj kaj domrestaĵoj estas esplorotaj, sed la akiritaj rezultoj ebligas konkludojn, kiuj povos esti konfirmataj per postaj esploroj.

La esploro de la domrestaĵoj montris, ke la bornholman konstrumanieron karakterizis vandoj el fostoj, vergoj kaj argilo kontraste al la ŝtonaj ferepokaj domoj sur *Öland* kaj *Gotland*. Tre grandaj kvantoj de la brulmalmoliĝintaj vandmaterialoj klare montris la konstruon de la vandoj. La argilo estis ĵetata sur la vergan plektaĵon el vertikalaj stangetoj, inter kiuj estis plektitaj horizontalaj vergoj. Tiuj vandoj estis relative maldikaj kaj tute ne portivaj. Tial ne estas mirige, ke kelkaj fortikaj vandpartoj havas premsignojn de dika fosto. La plej bonajn ekzemplojn ni konas de *Sorte Muld* (4-a—5-a jarcento p. Kr.), dum la plej aĝa restaĵo de *Dalshøj* (1-a jc. p. Kr.) plej bone montras la lokadon laŭ la vando (fig. 2). Sur la interna flanko oni rimarkas fortikajn fostojn tiel lokitajn, ke proksimume la duono estas ĉirkaŭita de la vandargilo, dum la resto estas libera. Ŝajnas laŭ la premsignoj en la argilo kaj en la planko, ke plej ofte estis uzataj rondaj glataj trunkoj.

La vandoj de la ferepokaj domoj estis rektaj, kiel montras klare la skizo (fig. 2). Tio igas kredi, ke sur ili kuŝis laŭlonge traboj portataj de la vand-

fostoj. Sur la traboj kuŝis dudekliva tegmento, kiu tamen estis portata ĉefe de du paralelaj vicoj da fostoj tra la longo de la domo. La malmultaj fostoj en la mezo de la domo veršajne subtenis rekte aŭ nerekte firstotrabon. Ankaŭ la du internaj fostovicoj estas rektaj — tio sendube signifas, ke ili portis trabojn subtenantajn la ĉevronojn. La ligno de la fortika armaturo estis, juĝate laŭ la brulrestaĵoj en la fostotruoj, el kverko, arbo evidente pli ofta en la ferepoko ol nun.

La konstrumanieron per fortikaj vandfostoj oni ne konstatis en la multaj jutlandaj ferepokaj domrestaĵoj, sed oni trovis similajn sur *Fueno* kaj insularo *Aaland* kaj unu sur *Gotland*. Ĝi estas do orienta fenomeno.

La loĝejo de la 1-a jarcento p. Kr. estas nur longa domo dividita per transversa vando en du ĉambrojn, unu granda por homoj kaj unu malgranda, la stalo, ambaŭ kun propra enirejo. Sed la loĝejo de la malfrua ferepoko estis bieno de du domoj, kun respektive ortangula kaj L-forma planoj (fig. 1). Evidente okazis evoluo al pli grandskalaj cirkonstancoj. Inter la aliaj šanĝoj de la frua roma ĝis la frua ĝermana ferepoko estas konstatate, ke la puŝmuelilo estas anstataŭigata per la turnmuelilo, kaj la karakterizaj malnovaj batštonoj ne aperas en la malplej aĝaj tavoloj. Ĉi tie — en malfrua tempo — ilin kredeble anstataŭis feraj marteloj. Ni vidas, ke la popolo vigle sekvis la evoluon. La alternantaj modoj de ornamaĵoj multnombre elfositaj (neordinare en domrestaĵoj) klare montras tion. Ni tamen ne konas la kondiĉojn de la L-forma domo en la proksima ĉirkaŭo de *Bornholm*, sed ĉar domrestaĵoj de la frua ferepoko estas nur tre malofte trovitaj, ni devas ne troigi la signifon de tiu sporada materialo.



Fig. 2.

Skizo de la domrestaĵo de *Dalshøj*.

Cetere la iloj en la domoj ne estis grave šanĝataj. Dum la stala parto, kiu en la *Dalshøj*-domo havas gruzan plankon, preskaŭ ne enhavas trovaĵojn, tiaj estas pli nombraj en la loĝeja parto. Tie estas plie la kunvenejo, la fajrejo, kiu kelkfoje estas farita el argilo kaj lokita super la planko. La fajro brulis sur rondo de štonoj. Apude, sur la fajrejo, staris argilaj vazetoj, kaj sur la planko, proksime, staris pli grandaj vazoj. Fera tranĉilo estas postlasita ĉi tie apud osta špinpezilo. Špinado estas ja grava parto de la vestfarado. Lanon oni ricevis de šafoj, kiuj estis bredataj pro ĝi kaj pro la viando. Pri tio atestas multaj fenditaj ostoj. Per špinpeziloj uzitaj ĝis nia tempo ni scias, kiel la špinado okazis. La lano estis vindata ĉirkaŭ bastonon tenatan per unu mano. Iomete de la lano estis fiksata al la supro de la špinilo. Per la dua mano la virino rotaciigis la špinilon, kiun stabiligis la ronda špinpezilo, kaj formis per la fingroj la fadenon, kiu šajne glitis el la lano. Iom post iom la novfarita fadeno pliiginta la distancon inter la manoj estis vindata ĉirkaŭ la špinilon.

La teksilon oni plej bone konas de la L-forma domo de *Sorte Muld*, kie ĝi staris en la malgranda alo. Ne malproksime de tiu virina ejo kuŝis bela longa kombilo (fig. 3). La teksilrestaĵoj estas plej bone konservitaj el ĉiuj trovitaj en domrestaĵoj. La karakterizaj rondaj tekspeziloj el bakita argilo kuŝis sin reciproke apogante. Ili estis falintaj kelkajn centimetrojn kaj kuŝis ekzakte, kiel ili siatempe pendis. La fajro subite detruis la drapon kaj la teksilon, sed la peziloj nur ruĝbakiĝis. Je la falo de la domo la peziloj, el kiuj nur malmultaj ruliĝis el la vico, estis kovrataj de konservanta tavolo. Iom ekster tiuj peziloj estis ambaŭflanke fostotruo, en kiu estis starinta la oblikva flankfosto.

Laŭ similaj teksiloj uzitaj ĝis ĉirkaŭ j. 1800 oni konas la konstru- kaj funkcimanierojn. Supre, sur la disbranĉoj de la du fostoj, kušas horizontale ronda trabo. Ĝi estas turnebla, kaj de ĝi pendas vertikalaj šnuroj, la varperoj, malsupre pezigataj per la peziloj kaj dividitaj en du arojn. Unu aro estas antaŭen kaj malantaŭen šovebla per movebla ligna bastono, kaj inter tiujn du interšanĝiĝantajn šnurarojn estas metata la vefto. Malgraŭ sia simpleco ĝi estas efika teksilo, kaj pri tio brile atestas ĝia miljara senšanĝa formo.

Grava parto de la ekipaĵo estis la forno, kiun oni konstatis en unu el la domoj de la *Sorte Muld*-bieno kaj en la pli malnova *Dalshøj*-domo (fig. 2). En la *Dalshøj*-restaĵo estas vidata la karakteriza hufoferforma plano proksime al la fajrejo. La kupolforma supraĵo de la forno de *Sorte Muld* kuŝis kunfalinta sur la flankon, kiu estis ankoraŭ konservita ĝis kelkcentimetra alto. La bakfornoj estis konstruitaj el la sama materialo kiel la vandoj, argilo sur verga plektaĵo. La bakado kredeble okazis laŭ tradicia maniero. Oni hejtis la fornon ĝis preteco, elprenis la ardaĵon kaj enmetis la panojn. La aperturo estis fermata, kaj post kvaronhoro la novbakitaj panoj povis esti elprenataj.

La bakado kondiĉis grenkulturadon, sed ĝuste atestoj pri tio estas abundaj en la domrestaĵoj. En la mezparto de la pli malnova *Dalshøj*-domo kuŝis

amasoj da brulinta greno (fig. 2). Supozeble la plejmulto estis tenata sur bretoj sub la tegmento kaj ekflamis je la brulo. Tial ĝi karbiĝis kaj konserviĝis, dum ĝi alie ne povus esti konservata dum tiel longa tempo. Cetere la grentrovaĵo de tiu domo estas la plej granda el ĉiuj ĝis nun trovitaj en antaŭhistoria domrestaĵo, kaj la determinado daŭros proksimume unu jaron. Oni tamen povas diri jam nun, ke ĝi konsistas ĉefe el hordeo, sed ankaŭ — kontraste al okcidentdanaj trovaĵoj — i.a. el tritiko. Per tio estas denove akcentataj la orientaj rilatoj de *Bornholm*, ĉar oni je ĵusaj grentrovoj sur *Gotland* konstatis multe da tritiko. En la *Dalshøj*-trovaĵo kaj precipe en tiu de la L-forma domo de *Sorte Muld* estas iom da sovaĝherbaj semoj, kies specoj estas tre gravaj por la kompreno pri la vegetajaro entute. Kiel montras klare la enhavo de kadavroj trovitaj en marĉoj, oni manĝis la sovaĝherbajn semojn kune kun tiuj de la kulturitaj plantoj — preskaŭ same kiel ni nun metas



Fig. 3.

Objektoj trovitaj en la bieno de *Sorte Muld*. Supre maldekstre kombilo, sub ĝi dika pinglo, aleno kaj glitŝuo, ĉiuj el osto. Dekstre supre ŝpinpezilo, malsupre tekspezilo el bakita argilo.

papavajn semojn sur bulkojn. La semoj, kaj grenaj kaj sovaĝherbaj, estis cetere tre grandaj kaj bone evoluintaj. La ferepoka terkulturisto povis ĝoji pro fekundaj kampoj.

Ŝajne oni pendigis la vestaĵojn sur la vandon. Ĉe la suda vando de la *Dalshøj*-domo estis trovataj tri bronzaj fiboloj por la ŝultra kaj antaŭa partoj de robo. Ankaŭ en *Sorte Muld* estis trovataj pluraj tiaj karakterizaj ornamajoj, kiuj bone determinas la kulturfazojn.

Meze en la *Dalshøj*-domo kuŝis pecoj de fromaĝa vazo, konusa argilvazo sen fundo kaj kun multaj truoj en la vando. Ĝian funkcion oni determinis per similaj vazoj uzitaj sur *Bornholm* ĝis meze en la antaŭa jarcento. La fundo estis ligna plato; en la vazon oni metis tolon. La kazeiĝinta lakto estis enveršata, tiel ke la selakto elfluis tra la vandotruoj. Poste oni surmetis pezilon, kiu elpremis la lastan selakton el la kazeo.

La lakton por la fromaĝo oni ricevis de bovinoj, bredataj kun ĉevaloj, ŝafoj kaj porkoj. Plie oni havis kokinojn kaj anserojn. Multaj fenditaj bestostoj montras, ke la bestoj estis ŝatataj ne nur pro la varmo, kiun ili donis al la kunvivantoj en la domoj.

Ne nur en la domoj sed ankaŭ ekstere estis multaj trovaĵoj. Precipe interesaj estas la proksime al la *Sorte Muld*-bieno trovitaj ferfanda forno kaj kuirtruo.

La fandforno estis 1,6 m longa truo plenigita per gruzo, lignokarba polvo, ŝtonoj kaj skorio. Plej malsupre kuŝis, klarvideble paralele, lignotraboj. Super tiuj, inter ŝtonoj, okazis evidente la brulado. La skorio estis rubo de limonitfandado. Tiu fornospeco estis antaŭe uzata en Jutlando, kie oni konstatis, ke la paralelaj traboj en la fundo konsistigis vandojn de aerkanaloj ebligantaj plivigligon de la brulo kaj per tio plialtigon de la temperaturo. La gruzo en la forno estas sendube rubo de fajrodetruitaj ŝtonoj, ĉar pluraj ŝtonoj estis jam tre malfortikaj.

La dua truo estis aliforma. Ĝi reprezentis plurain uzostadioin, ĉiuj apartigitaj per argiltavoloj. Sur la argilo kuŝis tavolo de lignokarbo kun fajrodetruitaj ŝtonoj, ostoj kaj potpecoj kaj aliaj antikvaĵoj. Tiaj truoj estas ankaŭ konataj de aliaj skandinavaj ferepokaj domrestaĵoj. Per la varmigitaj ŝtonoj oni rostis viandon bone enpakitan en verdajn foliojn k.a. Oni raĵtas supozi, ke la bornholmaj truoj estis simile uzataj, kaj ke ankaŭ kuirvazoj estis metataj inter varmegajn ŝtonojn.

Impreson pri la vintraj plezuroj donas glitŝuo, bone farita kvankam ne kompleta, trovita sur *Sorte Muld* (fig. 3). Ĝi estas la plej frua ekzemplero konstatita en Danlando. La glitŝuo estas tranĉita el svelta fortika osto transverse traborita en ĉiu fino. Por povi firme ligi la ŝnuroin oni faris ambaŭflanke tranĉfendon al ĉiu truo. La ŝnuroj estis ligataj tra la truoj kaj super la ŝuo kaj nodataj sur la pieddorso, tiel ke la glitŝuo sidis absolute firme. Ĝis antaŭ duona jarcento tiaj glitŝuoj estis ankoraŭ uzataj sur *Bornholm*. Oni

ne kuris per ili kiel per modernaj glitšuoj, sed tenis ilin paralele, klinis sin antaŭen, fleksis iomete la genuojn kaj puŝis pikilbastonon inter la gamboj takte al la glacio. Per tio oni akiris imponan rapidon, kaj estis sufiĉe da proksimaj lagetoj por sportemaj kaj fiŝkaptemaj homoj.

Kiam ni tiel, pecon post peco, kunmetas la rezultojn de la elfosado, ni ekvidas la konturojn de viva socio bazita sur evoluinta terkulturo. Oni loĝis en bieno, ĉu el unu longa alo aŭ du dometoj, havis dombestojn sub la sama tegmento kaj ĝuis dum la vintro ilian varmon. Jam en tiu frua epoko ni rimarkas la karakterizan konstrumanieron de *Bornholm:* aparte situantaj bienoj. Ĝis nun neniu vilaĝo estas konstatita. La emo de la bornholmano esti propra mastro vidiĝas jam antaŭ dumil jaroj.

Laŭ la rezultoj de la elfosado oni konstruis en 1950 en la Muzeo de *Bornholm* miniaturan kopion de la bieno de *Sorte Muld* (fig. 1). Netakseble valora por la elfosantoj estas tia — kvankam ne plenformata — rekonstruo, kiu ebligas al ili kontroli siajn observojn kaj konkludojn.

Sed oni trovis sur *Sorte Muld* kaj ĉe *Dalshøj* ankaŭ aliajn objektojn ĝis nun ne priskribitajn, ĉar ili ilustras alian flankon de la vivo.

Sur la planko de la *Dalshøj*-domo de la 1-a jarcento p. Kr. kuŝis krom la menciitaj iloj kaj ornamajoj lancopinto, kiu tamen similas nur al la tiutempa tombekipaĵo. Ke la domo kiel la aliaj trovitaj estas brulinta, jam ne nepre atestas pri milito; tamen ni komprenas, ke la vivo tiam ne estis nur paca en tiuj socioj.

Tion klare montris la trovo de 17 ormoneroj proksime al la alia ankaŭ brulinta domo ĉe *Dalshøj* (el la 5-a jc. p. Kr., datita per bronza fibolo k.a.). En nivelo iomete sub tiu de ĉi tiu domrestaĵo kuŝis moneroj ĉefe el la 5-a jarcento p. Kr., la pli multaj kaj pli aĝaj de la tempo de Theodosius II (408-450), la malpli aĝaj de Anastasius (491-518). La moneroj estis iom disigitaj de plugilo, sed proksimume meze kuŝis du sub plugnivelo en netuŝita tavolo. Tio estis tre grava por determini la apartenon. La monerojn evidente kaŝis tuj sub la herbo la loĝantoj de la domo, kiuj subite forlasis la hejmon, kiun detruis la flamoj. Ili ne reprenis la oron. Kial?

De la sama tempo, 5-a jarcento p. Kr., devenas aliaj trovoj de tiaj ormoneroj, *„solidi"*, multaj ĝuste en tiu regiono. *Öland* kun proksimume samtempaj ormoneraj trezoroj kaj *Gotland* kun pli vasttempaj ortrovaĵoj konfirmas la ĝeneralan impreson pri milito en Baltika Maro iganta la loĝantojn kaŝi valoraĵojn dum danĝero, kompreneble por repreni ilin post ĉeso de la danĝero.

La pruvon pri fremdula invado sur *Bornholm* donas la rifuĝkasteloj. *Gamleborg* en la sudokcidenta parto de *Paradisbakkerne* montriĝis per trovitaj argilvazaj pecoj samtempa kun la bieno de *Sorte Muld,* kaj la saman rezulton donis la esploro de la ringokastelo, kaj la bildo nun estas kompletigata. Pro la rabinvadoj sur *Bornholm* oni devis fari en la sovaĝa malantaŭa tereno rifuĝejojn por homoj kaj brutoj. Longtempe oni ne restadis en la rifuĝkasteloj:

por tio la konstrurestaĵoj estas tro malmultaj: fajrejoj kaj restaĵoj de simpla domo aŭ tendo.

Impone situas *Gamleborg* kun la dorso al la fenditaj kaj neloĝeblaj *Paradisbakker* (fig. 4). Oni ne povas imagi pli taŭgan rifuĝejon por la loĝantaro de la regiono de *Gamleborg*, la izola 26 m alta roko, kies kastela platoĵo havas proksimume 200 × 80 m². De du flankoj, okcidento kaj nordo, estas konstruitaj vojo kaj vojeto al la platoĵo. La kruta deklivo tamen estas pasebla en aliaj lokoj, sed supre la roko estas gardata de tera kaj ŝtona remparo. Ĝi malfermas sin por la vojo kaj la vojeto, kaj sude ĝi havas finon super rokokrutaĵo.



Fig. 4.

Gamleborg en *Paradisbakkerne* vidata de okcidento.

La remparo, kiun plifortigas norde alia remparo, estas konstruita per grandaj elhakitaj granitblokoj. La plej multaj el tiuj nur povas esti trenitaj tien de malsupre, impona laboro atestanta pri interkonsentinta loĝantaro. Tuj malantaŭ la remparo kuŝas la municio, glataj strandŝtonoj, en amasoj. Oni klopodis rebati la atakantojn per ŝtonpluvo, antaŭ ol oni uzis siajn multekostajn ferajn armilojn.

Por longdaŭra sieĝo la kastelo ne estis destinita, sed granda kavo sur la platajo nur dum la plej varma tempo ne enhavas pluvakvon kaj certe povis provizi loĝantaron per akvo dum pluraj tagoj. Tamen *Gamleborg* kredeble ne estis fortikajo — pli verŝajne oni uzis ĝin por doni sekurecon al la moveblaj posedajoj, brutoj, ĉevaloj kaj si mem, kaj nur la batalspertaj viroj prizorgis la defendotaskojn.

La defendosistemo ne konsistis nur el la rifuĝkastelo. *Rispebjerg* kun la ringokastelo informas pri la pliaj preparoj. La ringokastelo estas fakte nur elkliniĝinta parto de *Rispebjerg* apud la tre kruta kaj profunda riverbordo, apartigita per 2 m alta remparo kaj plie sekurigita per antaŭa fosajo. Tie malantaŭ la remparo estas la rifuĝejo, kiu ne bezonis defendon al la riverflanko. De la remparo eliras malpli alta remparo oblikve al la rivero. Iom pli oriente situas aparte fortika remparo, ankaŭ 2 m alta, el kiu tamen nur partoj estas ankoraŭ konservitaj. Sur la ebena tereno oni evidente bezonis plian sekurigon kontraŭ malamikoj venantaj de ĉi tie. Ĉar oni ne trovis sur tiu remparo — kiel ankaŭ ne sur la remparoj de la ringokastelo kaj *Gamleborg* — restajojn de palisaroj, ni povas supozi, ke oni plantis kratagojn kiel barilon sur la remparoj. Densa kratagaro estas hodiaŭ sur la orienta antaŭa remparo de la ringokastelo *(„Bukkediget")*, kaj ĝi estas efika.

Restajoj de similaj remparoj estas troveblaj en la suda parto de la insulo, kaj nun oni konstatis kelkajn ankaŭ en la orienta parto. En la arbaretoj oni trovas ilin en ioma distanco de la marbordo, ofte paralelaj kun tiu. Veraj fortikajoj ili apenaŭ estis, pli verŝajne bariloj, ekzemple kontraŭ forrabo de brutoj. Sed certan solvon oni ankoraŭ ne povas prezenti. Pliaj esploroj estas necesaj, kaj ili estas en la programo, kiu espereble baldaŭ povos esti finata.

Tradukis H. V. RASMUSSEN.

6.912
595

412 : 408.92 : 491.2

KOMPARO DE LA ESPERANTA KORELATIVA TABELO KUN LA SANSKRITA

de D-ro K. AMMER, Privatdocento en la Viena Universitato.

Sendube en la sistemo de la mondhelplingvo Esperanto unu el la punktoj plej ofte kritikataj kaj atakataj estas la tiel nomata korelativa tabelo, per kiu la eltrovinto de tiu ĉi helplingvo penis krei simplan, facile lerneblan kaj plenlogike konstruitan artan anstataŭajon de la diversaj pronomaj formajoj montrantaj speciale en niaj okcident-hindoeŭropaj idiomoj preskaŭ nepenetreblan amason da varioj, kiuj nur malofte malgrandmezure interligiĝas per normigantaj analogiaj tendencoj. Senĉese oni riproĉas al Esperanto, ke tiuspecaj artefaritaj kaj laŭlogike kunmetitaj vort-eroj donas al la lingvo aspekton entute ne-naturan kaj krome eĉ tro malbelegan; tial ankaŭ poste

ĉiuj mondlingvanoj, klopodante pliboniĝi kaj reformi Esperanton, zorgeme penadis eligi ĉi tiujn „monstrajojn" kaj anstataŭigi ilin denove per la varia

	K	K[1])	T	Ĉ	K- AJN
IU	kas	yas	sas[5])	sarvas	kaŝ-ĉid[2,3]) ĉana
IU[4])	ka-(sm)-	ya-(sm)-	ta-(sm)-	sarva-(sm)-	ka-(sm)-[2]) ĉid, ĉana
IO	kim[5])	yad	tad	sarvam	kim-ĉid[2]) ĉana
IES	kasya	yasya	tasya	sarvasya	kasya-ĉid[2]) ĉana
IA	kas	yas	sas[5])	sarvas	kaŝ-ĉid[2,3]) ĉana
IE(N)	kutra[6]) kvā	yatra	tatra	sarvatra	kutra-ĉid[2,6]) kva-ĉid
IAM	kadā	yadā	tadā	sarvadā	kadā-ĉid[2]) ĉana
IAL	kasmāt	yasmāt	tasmāt		kasmāĉ-ĉid[2]) ĉana
IEL	kathā[7]) katham	yathā	tathā	sarvathā	kathā-ĉid[2]) katham-ĉid
DE IE	kutas[6])	yatas	tatas	sarvatas	kutaŝ-ĉid[2,6])

[1]) En Sanskrito oni diferencigas la demandan pronomon (kun *k-*) de la relativa pronomo (kun *y-*; elp. j)!
[2]) La afikson *ĉid* kaj *ĉana* ĉiam uziĝas egalvaloraj.
[3]) Elparolu ŝ kiel palatalan *s* en pola lingvo.
[4]) Sur tiu fleksia formo baziĝas ĉiuj aliaj gramatikaj formoj.
[5]) Izolita formo kun laŭregula fleksio.
[6]) Speciala sonŝanĝo de a al u en la unua silabo.
[7]) Formo malofta.